




# La Merkato





## La Enhavo

- Vortoj al la legantoj (*John Huang*) \_\_\_\_\_ p.3
- Intervjuo kun s-ro Roland Rotsaert, Honora Prezidanto de IKEF  
(*Chimedtseren Enkhee kaj John Huang*) \_\_\_\_\_ p.5
- Perspektivo de Eŭrazia ekonomio (*Chielismo Wang Tianyi*) \_\_\_\_\_ p.10
- Monda migrado en la 21-a jarcento (*Andy Blair*) \_\_\_\_\_ p.14
- Venu kaj konu, Mongolio atendas vin! (*Chimedtseren Enkhee*) \_\_\_\_\_ p.23
- Skize pri Tanzanio, gastiganta lando de la 109-a UK (*Gendo Francis*) p.31
- Juvelina, la esperantista vitristino (*Katlin Kovats*) \_\_\_\_\_ p.35
- Prezentas la mondon de Wix: Wix-Partnero (3) (*Yas Kawamura*) \_\_\_\_\_ p.38
- Aplikado de Esperanto en komerco kaj ekonomio (*ChatGPT*) \_\_\_\_\_ p.48
- Sano, sukceso kaj Esperanto (*Jozefo Marton*) \_\_\_\_\_ p.49
- Produktoj kaj varoj de Suda Brazilo (*Jorge Linck*) \_\_\_\_\_ p.57
- Invito por esplori ekskluzivajn nemoveblaĵojn en Hispanio  
(*Samuel Adebawale*) \_\_\_\_\_ p.59

Sur la komenca kovrilpaĝo: fotoj de la kontribuantoj de ĉi-tiu numero:

*Roland Rotsaert, Chielismo Wang Tianyi, Chimedtseren Enkhee, Andy Blair, Yas Kawamura, Jozefo Marton, Gendo Francis, Katlin Kovats, John Huang, Samuel Adebawale, ChatGPT.*

**Redaktoro:** *John Huang* ([info@ikef.net](mailto:info@ikef.net))

**Provleganto:** *Chimedtseren Enkhee*

**Nia retejo:** [www.ikef.info](http://www.ikef.info)

**Retmesaĝa adreso:** [info@ikef.info](mailto:info@ikef.info)

**Retlisto ĉe Google:** [komerco@googlegroups.com](mailto:komerco@googlegroups.com)

**Facebook-paĝo:** IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

**Facebook-grupo:** Komerco helpe de Esperanto

# Vortoj al la Legantoj

Karaj legantoj,

Dankon al vi pro tio ke vi eklegas la 103-an numeron de *La Merkato*!

La Honora Prezidanto de IKEF, s-ro Roland Rotsaert, estas unu el la pioniroj de IKEF. Li ankaŭ estis la redaktoro de nia revuo *La Merkato*



dum multaj jaroj. En **“Intervjuo kun s-ro Roland Rotsaert”** li recenzis la fruan historion de IKEF kaj rakontis kelkajn malmulte konatajn historiajn faktojn. Li disponigis multajn valorajn fotojn kaj prezentis bonajn sugestojn por la estonta laboro de IKEF.

Baldaŭ okazos la 108-a UK en Torino, Italio. Ĉefa temo de ĉi-tiu UK estas pri enmigrado. S-ro Andy Blair estas enmigrada konsultisto en Kanado. En sia artikolo **“Monda Migrado en la 21-a Jarcento”**, Andy sisteme rakontis la gravan rolon kiun enmigrintoj ludis en formado de la moderna mondo, kaj historie kaj praktike. Li analizis la gravajn faktorojn kiuj influas al tutmonda migrado en la 21-a jarcento el multoblaj perspektivoj.

En ĉi-tiu numero, Prezidanto de IKEF s-ro Ĉielismo Wang Tianyi prezentas sian artikolon titolitan **“Perspektivo de Eŭrazia ekonomio”**. Kio estas Eŭrazio? Kiajn valorojn kaj signifojn la eŭrazia ekonomio havas? Kio diferencas inter Eŭropo kaj Azio? Ĉi-tiu saĝa, trafa kaj unika artikolo donas la respondojn.

Venontjare en Mongolio okazos somera kurso de IKEF-Kolegio. Alie, turisma kampo interesas la organizon IKEF kaj ĝi bonvenigas ĉi-rilatajn artikolojn. Tial, s-ro Chimedtseren Enkhee verkis artikolon **“Venu kaj konu, Mongolio atendas vin!”** ĉefe pri la turismaj aspektoj de Mongolio, do ni ĉiuj havos pli bonan scion kaj komprenon pri historio, geografio, kulturo, kaj la buntaj vivoj de la mongola popolo.

Por multaj homoj, Tanzanio ĉiam estis mistera kaj alloga lando en Afriko. Venontjare okazos la 109-a UK en la bela urbo Aruŝo en la lando. s-ro Gendo verkis artikolon **“Skize pri Tanzanio, gastiganta**

**lando de la 109-a UK**” por ni, specife prezentante la historion, kulturon kaj pitoreskajn lokojn de Tanzanio.

Multaj el vi konas s-inon Katalin Kovats kiel fama Esperanta edukisto, sed malmultaj scias ke ŝi ankaŭ havas sian entreprenon. En sia interesa artikolo **“Juvelina, la esperantista vitristino”**, Katalin diras al vi sian rakonton ke en la lastaj dek jaroj, plejparte per memlernado, ŝi fariĝis ankaŭ vitroartisto.

En sia artikolo **“Prezentas la mondon de Wix: Wix-Partnero (3)”**, Vicprezidanto de IKEF s-ro Yas Kawamura daŭrigas sian prezenton pri Wix. Tiuj, kiuj volas konstrui siajn komercajn retejojn, povus profunde studi ĝin.

Ni estas en epoko de homa-komputila interago, kaj artefarita inteligenteco reprezentas la estontecon. ChatGPT estas tipa ekzemplo. En tiu-ĉi numero, mi faris eksperimenton, mi provis lasi ĝin skribi artikolon **“Aplikado de Esperanto en komerco kaj ekonomio”**, la rezulto ŝajnas bona kaj logika. Legu kaj ĝuu.

Jozefo Marton estas hungara komercisto. Li havas mirindajn sanigajn produktojn por Esperantujo: LA FLAVON-PRODUKTOJ. Do, kio estas ili? Kial ili povas helpi vin iĝi pli sana kaj eĉ pli riĉa? Legu lian artikolon **“Sano, sukceso kaj Esperanto”**.

En sia artikolo **“Produktoj kaj varoj de Suda Brazilo”**, Jorge Linck, la Esperanto-komercisto el Brazilo prezentas siajn lokajn produktojn kaj varojn kiuj estas disponeblaj por komercumi.

Ĉu vi iam pripensis aĉeti domon en Hispanio? s-ro Samuel ADEBOWALE estas ĝusta agento pri nemoveblaĵoj en Hispanio. En sia artikolo **“Invito por esplori ekskluzivajn nemoveblaĵojn en Hispanio”**, li donis al vi detalan enkondukon al ĉio, kion vi bezonas scii pri investado en la kampo.

Koran Dankon!

John Huang



Redaktoro de *La Merkato*

[info@ikef.net](mailto:info@ikef.net)

**La Merkato**

## Estas granda sukceso, ke okazas ĉiusemajnaj kunvenoj

*Sekretarioj de IKEF s-ro Chimedtseren Enkhee kaj s-ro John Huang faris intervjuon kun Honora Prezidanto de IKEF s-ro Roland Rotsaert.*



**Roland Rotsaert**

- **Saluton s-ro Roland Rotsaert! Nia mondo, Esperantujo bone konas vin kiel unu el la aktivaj pioniroj de IKEF. Ni komencu nian intervjuon pri via knabeco kaj ekesperantistiĝo. Do, kia knabo vi estis? Kie vi naskiĝis? Se permesus, ni petas vin sinprezenti pri vi kaj viaj gepatroj.**

Roland Rotsaert (Plu **R**): Mi naskiĝis en Brugge (Bruĝo, Bruges), Belgio, en 1950 kaj pasis mia juneco en najbara vilaĝo Oostkamp. Miaj gepatroj estis farmistoj, krome mia patro estis transportisto. Post mezlernejo kaj militservo mi eklaboris ĉe banko.

En 1970 mi komencis memlerni Esperanton dum mia militservo, sed rezignis. Ĉirkaŭ 1980 mi aliĝis al loka grupo kaj lernis en oficiala kurso.

- **De kiam, kie vi eklaboris post via lernado?**

**R:** En la financa kampo (ekde fino de 1970) mi plenumis diversajn taskojn en banko, laste kaj plej longtempe en kampo de internacia komerco. Ekde 1987 mi eklaboris kiel sendependa konsilisto pri internacia komerco. Tio ne estis tiom sukcesa kaj post kelkaj jaroj mi laboris en administrejo de universitato. Mi ekde 1990 ĝis la pensiĝo en 2010 laboris en belga ŝtata revizorejo (fr: Cour des Comptes, en: Court of Audit) en Bruselo.

- **En la Movado kiajn laborojn aŭ taskojn vi havis kaj havas?**

**R:** Mi eniris en la estraron de Flandra Esperanto-Ligo (FEL, parto de Belga Esperanto-Federacio). En ĝi mi dum longa tempo estis kasisto (la librotenadon de FEL prizorgis dungitoj); mi kiel estrarano nur havis kontrolan/analizan taskon.

Ĉar la revuo *Monato* ekde la komenco havis (teknikan) ligon kun FEL, mi iĝis ĝia redaktoro pri ekonomio.

Mi estis konato de Cesar Vanbiervliet, la fondinto de la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet en Kortrijk ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-Fonda%C4%B5o\\_Cesar\\_Vanbiervliet](https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-Fonda%C4%B5o_Cesar_Vanbiervliet)). Post la morto de Cesar kaj lia ĉefa kunlaboranto Jan Hanssens mi, kun aliaj, prizorgis la fondaĵon. Nun ĝi ne plu ekzistas, sed mi daŭre dediĉas grandan parton de mia tempo al Esperantaj arĥivoj k.s.

- [Kiel vi unue aŭdis aŭ informiĝis pri IKEF?](#)

**R:** Mi estis iel informita pri la estonta fondo de IKEF (eble ĉar mi ricevis provnumeron de la bulteno *Laŭokaza Novaĵletero*, kiu aperis jam en 1984), sed mi ne estis en la UK de 1985 en Augsburg kaj do mi ne estis inter la fondintoj je la 6a de aŭgusto 1985.

- [Kiel vi unue partoprenis en agadojn de IKEF?](#)

**R:** Post la UK de Augsburg estis nur perleteraj kontaktoj. La 13an de septembro 1986, tri el la fondintoj (Franz Josef Braun, François-Xavier Gilbert (Efikso) kaj Lawrence Mee (Lorenc' Mi) kaj mi kunvenis en mia domo por pridiskuti pri praktika funkciado de IKEF.



Septembre 1986 ie en Belgio: F.X. Gilbert, L. Mee kaj R. Rotsaert

- Kia estis la situacio kaj kondiĉoj por antaŭenigi laborojn de IKEF tuj post ĝia fondiĝo kaj dum postaj kelkdek jaroj? Ĉu vi rakontus kelkajn interesajn aŭ amuzajn epizodojn rilate al la afero?

**R:** Ekde la komenco en la revuo aperis "identecŝildoj" de la membroj, per kiu la membroj donis detalajn informojn pri sia komerco. De tempo al tempo tiuj identecŝildoj estis grupigitaj en libreto, sed neniam estis disponebla kompleta, aktuala situacio. En iu momento, germana membro kaj programisto d-ro Hornecker proponis krei retan datumbazon en kiu ĉiuj membroj rekte povos registri sian propran identecŝildon kaj rigardi la identecŝildojn de aliaj membroj. En la komenca periodo de interreto nur malmultaj membroj uzis tiun servon. Anstataŭ ĝi venis la retlisto "Komerco". Mi opinias ke nuntempa versio de "identecŝildaro", estus en la retejo de IKEF, do tre utilis al la membroj.

Estis multaj provoj por fari terminologian laboron rilate al komerco kaj ekonomio. Estis eldonitaj kelkaj terminaroj, sed fakte tiuj estis ne multe pli ol adaptoj de ekzistantaj terminaroj. Estis dumtempa kunlaboro kun kanadano Rüdiger Eichholz, kiu ellaboris terminologian projekton (Pekoteko) surbaze de la tiam ofte uzata programo WordPerfect, sed post la morto de Eichholz kaj la forpuŝo de WordPerfect per Microsoft-programoj, la projekto mortis. Kun Franz Braun mi vizitis la tradukservojn de la Eŭropa Unio en Luksemburgo; ni estis afable akceptitaj, sed evidentiĝis ke ĉe IKEF ne estis la bezonataj homfortoj por povi ion kontribui.



*1995, dum la Tamperea UK: Simone Ledan, Roland Rotsaert, F.J. Braun*

- Kiel IKEF aliĝis al UEA? Ĉu IKEF okazigis siajn fakkunsidojn dum ĉiuj UK-oj?

**R:** IKEF aliĝis al UEA ekde la momento kiam ĝi havis la bezona tajn 100 membrojn, ĉar ĝi deziris havi komi tatanon ĉe UEA (tasko plenumita de d-ro

Gianfranco Polerani). En preskaŭ ĉiu UK okazis fakkunsido (samtempe ĝenerala kunveno) kaj ofte ni sukcesis viziti tieajn fabrikojn aŭ komercajn ĉambrojn.



*2006, dum la Florenca UK: Roland Rotsaert*

- Kiel vi opinias pri tio, ke kial nia antaŭa Prezidanto de IKEF demisiis de sia posteno?

**R:** Franz Josef Braun ne vere demisiis, kvankam li jam delonge serĉis postsekvanton. Li ne povis plenumi siajn taskon pro subita malsano. Mi pensas ke li ankoraŭ vivas, sed jam de pluraj jaroj ne plu estas kontakto kun li.

- Ĉu vi povus iom paroli pri nia revuo *La Merkato*? Ekde kiam vi komencis redakti la revuon kaj ĝis

**R:** La nomo de la revuo komence estis 'Laŭokaza Novaĵletero'. Ekde numero 27 iĝis 'La Merkato'. Komence ĝin eldonis Lawrence Mee, poste la tasko venis al mi. Ankaŭ, dum kelkaj jaroj redaktis ĝin germana esperantisto Daniel König.

Komence ĝi aperis trimonate, sed dum la lastaj jaroj tute mankis kontribuoj kaj pro la alveno de interreto kaj retpoŝto ĝi iĝis malpli grava kiel per apera komunikilo inter la membroj. La lasta numero (la 100-a) produktita de mi aperis en 2011.

- Kiajn rekomendojn vi havas por nia nuna revuo *La Merkato*?



**R:** Ĝi estas multe pli bela ol mi iam sukcesis fari kaj ĝi ankaŭ havas riĉan enhavon. Mi demandas min ĉu la redaktoro havos tempon por daŭre prizorgi ĝin kaj ĉu regule envenos artikoloj. Regula, eĉ simpla revuo gravas, ĉar per revuo (se ĝi estas zorge farita) la historio de la asocio estas registrita kaj restas alirebla por posteuloj.

- Kiel vi opinias kaj taksas nunan agadon de IKEF? Ĉu vi konsilus kaj rekomendus al nuna estraro pri eventualaj agadoj por plibonigi kaj pli antaŭenigi laborojn de IKEF? Kiel vi opinias pri estonto de IKEF?

**R:** Pro aliaj prioritataj taskoj mi dum la lastaj jaroj ne plu sekvis la aktivecojn de IKEF. Estas grandega sukceso ke okazas ĉiusemajnaj kunvenoj, io tute neimagebla antaŭ 20 jaroj. Ŝajnas ke, kiel antaŭe, maloftas konkretaj ekzemploj de internacia komerco per Esperanto. Du gravaj taskoj por IKEF estas la klerigo de siaj membroj per organizo de kursoj aŭ produktado de instruaj filmoj, kaj partopreno de IKEF-anoj al la terminologio laboro (<https://www.reta-vortaro.de/>).

- Koran dankon pro via renkontiĝo kun ni (virtuale). Jes ja, vi kaj viaj samideanaj kolegoj vere faris mirindan multon por nia organizo IKEF kaj la revuo *La Merkato*. Ni sincere deziras al vi feliĉan vivon, sukceson kaj bonfarton! Viaj konsiloj, komentoj, eĉ kritikoj ĉiam gravus al la laboroj de IKEF, ankoraŭfoje dankegon!

**R:** Ne dankinde! Mi bondeziras al vi kaj al niaj IKEF-anoj brilan sukceson, harmonian kunlaboradon kaj bonsanon! Dankon pro la intervjuo!



2011, dum la Kopenhaga UK: Polerani, Rotsaert, Kamelia Gao



## *Perspektivo de Eŭrazia ekonomio*



*Chielismo Wang Tianyi*

**E**ŭrazio konsistas el du partoj Eŭropo kaj Azio, inter kiuj ne ekzistas la maro tranĉanta la du partojn. Fakte ĝi estas unu kontinento Eŭroazio.

La kontinento Eŭrazio situas en la norda duonglobo geografie konektanta Pacifikon, Atlantikon, Hindan kaj Arktan oceanon.

### **Kio diferencas inter la du partoj?**

1) La suno estas plej grava forto influanta la vivon de la homaro, kaj ĝi ĉiutage leviĝas de la orienta Pacifiko (Azio), kaj malleviĝas en la okcidentan Atlantikon (Eŭropo). Tio influas la pensmanieron kaj lingvan logikon de la loĝantaro de la du partoj. Ekzemple, la orientano scias ke la suno leviĝas de la orienta maro, sed ne havas precizan koncepton, ke kie

la suno malleviĝas ĉu eble en montaron, ĉu arbaron, ĉu dezerton aŭ ien en foran lokon; sed male la okcidentano havas precizan koncepton, ke la suno malleviĝas en la okcidentan maron. Tiel la orienta Sun-Dio ĉiam estas alta kaj neatin-gebla, sed la okcidenta Sun-Dio ofte falas en la aktualan socion kun amatinuoj kaj filoj kiel la suno falas maron.




*Kuaŝu postkuras por kapti la sunon*



*Okcidenta legendo*

Tiel la eŭropa lingvo prenas prepozicion kiel destinaĵon por ĉia koncepto jam determinita antaŭe ekz. en maro, sed la azia prenas postpozicion kiel postan signon, kio ne estas antaŭe destinebla. Komprenneble, nuntempe ĉiu ajn lingvo jam estas influita de la eŭropa aŭ azia lingvo, ĉar la dupartaj popoloj jam migris unu la aliajn dum la miloj da jaroj, ĉar inter ili ne ekzistas netransebla obstaklo, male estas nur vasta eŭrazia stepo por longmigra tempo.



*Eŭrazio*

2) La pluvo estas tre grave influanta la vivon de la homaro, ĉar ĝi estas ĉiela donaco senkotiza por plantaĵo. Tamen la pluvo alvenas diference por Eŭropo en la vintro, por Azio en la somero. Geografie, Orientazio mankas vastan ebenajon kompare kun Eŭropo, sed ĝi povas nutri pli multe da homoj ol Eŭropo. Kial? Ĉar ĝia pluvo forte venas somere, kiam la planto bezonas la akvon.



*Survoje sur la silka vojo*



*Hodiaŭa fera silkvojo*

3) La temperaturo estas ankaŭ influanta la vivon de la homaro, ĉar ĝia altiĝo malfavoras al Eŭropo, sed favoras al Azio kun vaste interna regiono sen akvo. La alta varmeco boligas la maron kaj ĝia aerfluo nun povas atingi malproksiman internan regionon ekz. en la interna Ĉinio la altebenaĵo laŭ la Flava riverego nun verdiĝas kaj aperas lagoj en la sabla dezerto, ĉiuj urboj grandiĝas ĉirkaŭ dek milionoj da loĝantoj.

4) La kontinenta merkato denove prosperas kaj revenas la Silkvojo konstruita sur la moderna fervojo anstataŭ tradicia kamela karavano. Praktike por merkato de interna kontinento la ŝipo malhavas sian superecon. Unue, ŝipo ne povas veturi sur la tero; due, ŝipo malrapidas kompare kun la fervojo kaj ŝoseo; trie, kiam lokomotivo nun povas konduki 320 vagonojn da 4000 metra, la ŝipo ankaŭ perdos superecon je kvanto. Resume, la kontinenta ekonomio regos Eŭrazion anstataŭ la oceana ekonomio.

5) La prosperanta merkato de Eŭrazio alvokas efikan surteran trafikon, sed la afero ne estas simpla. Unue, politiko ĝenas internacian fervojan transporton, ekz. Antaŭ 25 jaroj Ĉinio jam havis projekton konstrui sian fervojon tra Mezaŭio laŭ Silkvojo al Eŭropo, sed Rusio ne permesis tion en sia ekonomia sfero, kaj nur ekde 2023 tion konsentis kaŭze de la milit-financa problemo, espriminte Rusio sian intimecon al Ĉinio. Sed Ĉinio atendis la rusian permeson dum 25 jaroj por sia projekto fervoja al Mezaŭio. Due, la moderna fervojo relopeza por transportado estas multkosta ke multaj landoj ne povas investi tian kapitalon. Miasperte la lokomotivo eŭropa eĉ irana estas moderna same kiel la ĉina, sed la fervoja fundamenta infrastrukturo ne povas subteni altan rapidecon kaj kargopezegon.

## Resume

- 1) Eŭrazio estas ĉefa kontinento por la homaro.
- 2) Altiĝo de temperaturo favoras al refoja prospero de la interna kontinento de Eŭrazio. En la interna kontinento aperos pli multaj grandaj urboj, kiuj donos al Eŭrazio pli vastan kaj grandan merkaton.
- 3) Silkvojo refoje prosperas baze per la moderna fervojo, kiu faros ekonomian retaron tra la kontinento Eŭrazio.
- 4) Eŭrazia merkatingo kondukas la mondon al la kontinenta epoko anstataŭ la pasinte oceana epoko.
- 5) Aperos la ekonomia federacio de Eŭrazio. Esperanto estos necesa kongrue al la supernacia federacio.



**Eŭrazio**

## Monda Migrado en la 21-a Jarcento

*Andy Blair, CRIC*

*Konsultisto pri enmigra juro*

*Halifakso, Kanado*



- **M**igrado ludis gravan rolon en formado de la moderna mondo. Estas laŭtakse ke pli ol 200 milionoj da homoj migris tra la globo en la 19-a kaj 20-a jarcentoj. La kialoj de migrado variis de ekonomiaj, politikaj, kaj sociaj faktoroj, inkluzive de serĉado de laboro, pli bonaj vivniveloj, kaj fuĝado de persekuto aŭ konflikto. Ĉi tiuj samaj faktoroj daŭre kondukos mondajn migrajn tendencojn ĝis 2100, sed unu aldonita faktoro ludas gravan kaj novan rolon: klimata ŝanĝo.
- La 19-a jarcento vidis masivan ondon de migrado trans la globo, karakterizita per eŭropa elmigrado eksterlande. Milionoj da eŭropanoj, precipe el Britio, Irlando, Germanio,
- Italio, kaj Skandinavio, migris al Nordameriko, Sudameriko, Aŭstralio, kaj Nov-Zelando. Ekonomiaj faktoroj kaj politika agitado kiel revolucioj kaj malsatkatastrofoj estis la primaraj kialoj de tiuj migradoj. La Irlanda Terpomo-Malsatkatastrofo (1845-1849), ekzemple, rezultigis la morton kaj delokiĝon de pli ol unu miliono da homoj, kaŭzante amas-elmigradon de Irlando ĝis Usono kaj Kanado. La Germana Granda Elmigrado (1816-1914) vidis pli ol kvin milionojn da homoj forlasi sian patrujon, esperante trovi pli bonajn ekonomiajn ŝancojn en la Nova Mondo.



Migrado ene de Eŭropo ankaŭ signife pliiĝis en la 19-a jarcento. La kresko de industriigo kreis novajn laborŝancojn, kondukante al kampara-urba migrado. Britio travivis signifan internan migradon, kun homoj moviĝantaj de la kamparo al grandurboj kiel Londono, Birmingham, Glasgovo kaj Manĉestro, serĉante laboron. La sama fenomeno okazis en aliaj partoj de Eŭropo kiel Francio kaj Germanio. En la frua 20-a jarcento, politikaj renversiĝoj en Eŭropo kaŭzis alian ondon de migrado. La Unua Mondmilito (1914-18) kaj la Rusa Revolucio (1917) kaŭzis la delokiĝon de milionoj da homoj. La Traktato de Versajlo kiu finis la 1-an Mondmiliton ankaŭ verkis novajn land-limojn kaj teritoriajn alĝustigojn, influante populaciomovadojn. La Dua Mondmilito vidis amasan delokiĝon de homoj sur senprecedenca skalo kiam milionoj fuĝis de konflikto kaj persekuto. Samtempe, migrado de evolulandoj al pli evoluintaj landoj komencis kreski.




*Bildo: Rifuĝintoj estas pli abundaj hodiaŭ*

Inter 1960 kaj 2019, la nombro da internaciaj migrantoj pliiĝis de 92 ĝis 270 milionoj, preskaŭ samrapide kun la kresko de la monda loĝantaro. Tutmonde, la procento de migrantoj tenis relative stabilan ĉirkaŭ 3% - kun migrantoj de Eŭropo malpliiĝantaj sed migrado de Afriko kaj Azio pliiĝanta. Tamen, antaŭ proksimume jardeko (2010), ĉi tio komencis pliiĝi, proksimiĝante al 4% hodiaŭ, precipe pro tutmondiĝo kaj kreskanta kvanto da rifuĝintoj.

La parto de eksterlandanoj en loĝantaroj de evoluintaj landoj pliiĝis, plialtigante la averaĝan proporcion de eksterlandanoj de 4,5 ĝis 12,0% en altenspezaj landoj. Multaj, kiel Francio, Italio kaj Britio nun havas unu dekonon ĝis unu sesono de siaj loĝantaroj eksterlandnaskitaj.

Germanio nuntempe havas pli ol 18% ...unu granda kialo estis la enfluo de sirianoj kaj ukrainoj lastatempe. Iuj aliaj iuj riĉaj nacioj, kiel Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Kanado, atingis eĉ pli altajn nivelojn de eksterlandnaskitaj, ĉirkaŭ kvarono de sia totala populacio. Rimarkindaj estas kelkaj mezorientaj landoj, precipe ĉirkaŭ la Araba Golfo, kiuj havas inter triono ĝis preskaŭ 90% de siaj loĝantoj kiel eksterlandaj laboristoj.

## La 20 plej grandaj landoj por migrado en 2020 (milionoj)



Fonto: UN DESA, 2021a


Aliaj subestaj kaŭzoj de moderna migrado estas bone konataj kaj vaste studitaj: malegaleco de loĝantarkresko inter riĉaj kaj malriĉaj landoj, ekonomia malegaleco kaj pli bonaj ekonomiaj eblecoj eksterlande, tutmondiĝo, politika malstabileco, milito ktp, do ni ne esploros tiujn detale. Unu menciinda, tamen, estas demografiaj ŝanĝoj. La naskfrekvencoj de multaj riĉaj landoj, inkluzive de Italio, Japanio, Germanio, Kanado kaj Sud-Koreio, estas multe sub anstataŭaĵo kaj iliaj populacioj maljuniĝas rapide, kondukante al labor-malabundo (inter aliaj efikoj).



Ĉi tiu demografia defio povus esti kompensita, iomete, per pliiĝita enmigrado, precipe de alt-fekundecaj regionoj, kiel ekzemple subsahara Afriko kaj sud-Azio. Ĉi tiuj landoj estas atenditaj daŭre havi altan loĝantarkreskon, rezultigante grandajn naĝejojn de junaj laboristoj avidaj migri serĉante pli bonajn ekonomiajn ŝancojn eksterlande.

Koncentrante sur la landoj en la Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluo (angle: OECD), forta pliiĝo en ilia proporcio de enmigrintoj estas antaŭvidita. Ĉi tiu kresko ne estas atendita multe influita de la teknologio aŭ edukado. Ekzemple, altiĝo de edukado en evolulandoj pliiĝas la propenson al elmigri, sed ĝi ankaŭ reduktas loĝantarkreskon; koncerne migradon, ĉi tiuj efikoj nuligas unu la alian. Entute, sub similaj enmigradpolitikoj al hodiaŭ, la meza parto de enmigrintoj en OECD-landoj pliiĝos de 12 averaĝe ĝis 25-28% dum la 21-a jarcento.

Oni taksas, ke ĉi tiuj sociekonomikaj tendencoj daŭre ludas gravajn rolojn por migrado ĉi tiu jarcento kaj estas bone studitaj. Tamen, subesta faktoro kiu ankoraŭ ne estas plene pripensita en la kunteksto de migrado fariĝos ĉiam pli grava: la ŝanĝiĝanta klimato.



Fonto: NOAA (Usono) Tutmonda Monitara Laboratorio, 2023

Estas vaste konsentite, ke antropocentra klimata ŝanĝo okazas, kaj la efikoj kaj plifortiĝas kaj akcelas. Sennombraj studoj kaj raporto, inkluzive de IPCC-raporto de la Unuiĝintaj Nacioj, antaŭdiras ke klimataj efikoj pliiĝos ĝis 2100

kaj poste, eĉ se modernaj socioj sukcesas atingi internaciajn celojn, kaj reduktas tutmondajn Forceja Gaso-Emisio ( $\text{CO}_2$ , ktp.) sufiĉe por teni tutmondajn temperaturo-pliiĝojn sub  $2^\circ\text{C}$  (tamen, tutmondaj emisioj daŭre pliiĝas ĝis nun (Internacia Energia Agentejo, 2022)). Ni ekkomprenis, ke tio nun estas kunligita kun rilata krizo: la nuna kolapso en biodiverseco.

Kiel ĉi tiuj gravaj problemoj influos tutmondan migradon en la 21a jarcento?

Ni unue konsideru la biodiversecan krizon, kiu multaj homoj konsideras kiel komenco de la Sesa amasa monda formorto. Nur unu ekzemplo estas la 45% malkresko en senvertebra speciopopulacioj dum la lastaj jardekoj (Dirzo, Young, et al. 2014). Nun ekzistas bona indicoj ke Forceja Gaso-Emisio (FGE) en la atmosfero estis grava kontribuanto - se ne tute respondeca - por la plej granda amasa formortokazaĵo de la mondo, tiu de la malfrua Permio (antaŭ 250 milionoj da jaroj) kiu ekstermis proksimume 95% de ĉiuj ekzistantaj specioj tiutempe (Cui, Ridgwell, Tong, Dal Corso, 2023).


Biodiverseco estas fakte grava por civilizo, ekzemple por fortikeco de niaj tutmondaj nutraĵsistemoj kontraŭ minacoj (kiel ekzemple, novaj malsanoj). Plej multaj el vi, kiuj legas ĉi tiun artikolon, jam vidis signojn de tio: la kolapso en populacioj de flugantaj insektoj. Ĉi tio jam havas efikon al polenado de multaj kultivaĵoj. Ĝis unu triono de la manĝaĵoj de la homaro dependas je la kultivaĵoj kiuj necesas polenadon de ĉi tiuj polenigistoj.

Ĉar akvaj manĝ-retoj ŝrumpas sub varmiĝantaj kaj acidigantaj oceanoj, stokoj de akvaj mango-specioj, precipe fiŝoj, vidos malkreskon. Pli ol 3 miliardoj da homoj nuntempe dependas de akvaj specioj por sia ĉefa fonto de manĝaĵo, kaj fiŝoj provizas la plej grandan parton de proteino konsumita de homoj. Plejparto de ĉi tiuj estas minacataj de kolapso de biodiverseco kaj klimata ŝanĝo, sed ni ankoraŭ ne vidis multe da rekta migrado kiel rezulto de perdo de akvaj specioj. Ĉi tio verŝajne ŝanĝiĝos post la 2050-aj jaroj.

Surtere, ni vidis kreskantajn trosekecojn, inundojn, ŝtormojn kaj arbarfajrojn. Ĉi tiuj ekstremaj veterpadronoj jam igas milionojn migri, kaj la tendenco intensiĝos dum la 21-a jarcento. Oni antaŭvidas, ke fine de ĉi tiu jarcento, pluraj regionoj de nia planedo fariĝos ne-loĝeblaj pro draste malsama klimato: ekz. temperaturo tro-pliiĝas, dezertiĝo, aŭ altiĝo de la marnivelo.

Tiuj lokoj inkludas malaltajn marbordajn teritoriojn, kaj regionojn kun alta incidenco de arideco kaj varm-ondoj. Kiel rezulto, homoj en ĉi tiuj lokoj estos devigitaj migri al pli sekuraj, pli loĝeblaj regionoj. Ni jam efike vidas "klimatajn rifuĝintojn" sed la kialoj de ilia migrado estas kutime maskitaj per aliaj kaŭzoj, ekzemple longdaŭra trosekeco kondukanta al politika malstabileco kaj milito en iuj regionoj. Tiel, ili ne estas kalkulitaj rekte kiel viktimoj de klimata ŝanĝo, kaj la vera problemo estas kaŝita.

### Projektita efiko de 3°C temperaturopliigo sur kultivaĵoj



Fonto: Monda Banko, 2010

Klimata ŝanĝo havos la plej signifan efikon al vundeblaj loĝantaroj. Homoj vivantaj en malriĉeco kaj tiuj kiuj dependas de natur-rimedo por supervivo estos plej malfavore trafitaj. En Afriko sude de Saharo, ekzemple, pli ol duono de la loĝantaro dependas de pluvnutrita agrikulturo por ilia vivteno. Kun sekecoj iĝantaj pli oftaj kaj pli severaj, aliro al pura akvo kaj manĝaĵ-sekureco estos trafita, kondukante al pli da delokiĝo kaj migrado.

Altiĝo de la marnivelo havos gravajn efikojn, ĉar malaltaj nacioj spertas pliigitan inundadon, marbordan erozion ...aŭ tute malaperos sub la ondoj. Laŭ nia nuna FGE-trajektorio, kio povus rezultigi proksimume 2.4°C tutmondan averaĝan surface temperaturoaltiĝon antaŭ 2050 (McKinsey & Co., 2022) kaj preskaŭ 3°C pliigo antaŭ 2100 (UN, 2022), ĉi tio metus ĝis 640M da homoj en risko de ĉiujara inundo pro altiĝo de la marnivelo (Kulp & Strauss, 2019).

Oni taksas, ke unu miliardo da homoj nun okupas teron malpli ol 10 m super la nunaj alta tajda linio, inkluzive de 230 M sub 1m de alteco (Kulp & Strauss, 2019). Urboj kiel Bangkok, Miamo, Mumbajo, Kantono, Londono, Kolkato, Novjorko, Ŝanhajo, Lagoso, Dako, Ĝakarto, Aleksandrio, Roterdamo kaj Tokio povus esti grave trafitaĵ – aŭ tute perditaj – antaŭ 2100. Ĉar la plej grandaj homaj loĝantar-centroj de la mondo tendencas situante ĉe aŭ proksime de la marbordoj, la efiko de marnivelo pliiĝo kaj pliiĝitaj ŝtormoj (kiel ekzemple, uraganoj kaj tajfunoj) estas antaŭvidita kiel senprecedenca.



*Bildo: Multaj malaltaj regionoj estas ofte induditaj nuntempe*

Estas ankaŭ grave rimarki, ke lastfoje temperaturoj estis 3°C super nia nuna mezumo, en la Plioceno (antaŭ 2.3 - 5 milionoj da jaroj), maroj estis 40 m pli altaj ol hodiaŭ. Ĉi tiu estas la marnivela ekvilibro, kiun ni estas survoje atingi, eventuale, iam post 2100 - kvankam ĝi povus daŭri jarcentojn por atingi ĉi tiun novan ekvilibron.


La altiĝo de la marnivelo estos sufiĉe malbona, sed ĝi estos nur unu el multaj klimataj faktoroj influantaj migradon en ĉi tiu jarcento. Eble la plej grandaj estos trosekecoj kaŭzitaj (aŭ plifortigitaj) de klimata ŝanĝo. Multaj bazkultivaĵoj, esencaj nutraĵoj por miliardoj da homoj, estas vundeblaj al akvomanko aŭ altaj temperaturoj. Ĉi tiuj kultivaĵoj inkluzivas preskaŭ ĉiujn bazmanĝaĵojn de la mondo kiel tritiko, rizo, maizo, sorgo, milio kaj sojfaboj. La atendataj efikoj de klimatŝanĝa sekeco sur tutmondaj kultivaĵoj estas alarmaj kaj povus havi katastrofajn sekvojn. Dum temperaturoj altiĝas, veterpadronoj ŝanĝiĝas kaj maroj pliiĝas, kultivaĵoj estas atenditaj malpliiĝi signife, influante manĝaĵsekurecon laj vivojn de milionoj da farmistoj ĉirkaŭ la mondo. Tritiko estas la plej vundebla kultivaĵo al sekeco, ĉefe kultivita en sekaj lokoj. Laŭ la Internacia Esplora Instituto pri Nutraĵpolitiko (angle: IFPRI), tutmonda tritika produktado povus malpliiĝi je 16% averaĝe por ĉiu 1°C temperaturpliiĝo.

Tritika rikolto en landoj kiel Aŭstralio, Barato kaj Usono jam estis trafita pro seka vetero. La malkresko de grajna produktado povus kaŭzi kreskojn da prezoj kaj malabundon de produktoj konsistitaj el tritiko, kiel pano kaj cerealo.

Rizo estas alia bazkultivaĵo kiu estas vundebla al sekeco, ĉar ĝi postulas grandajn kvantojn da akvo por kreski. Rizo estas la bazmanĝaĵo por pli ol duono de la monda loĝantaro, ĉefe en Azio. Tropikaj regionoj, inkluzive de Filipino, Vjetnamio, kaj Indonezio povus esti grave trafitaj per trosekeco, rezultigante kultivaĵ-malsukceson, malpliigitan provizon, kaj manĝ-malabundon. Maizo ankaŭ estas vundebla al sekeco kaj klimata ŝanĝo povus havi signifajn efikojn al produktado. Maizo estas grava bazkultivaĵo en Afriko, kiu dependas peze de pluvokvanto por kultivaĵ-kresko. Se la rendimento malpliĝos, ĝi havos malfavoran efikon al etaj bienuloj, kiuj konsistigas plejparton de la agrikultura sektoro. Tropikaj kaj subtropikaj latitudoj estas atenditaj esti plej grave trafitaj, ĉar altaj Malsekaj Bulbaj Temperaturoj (dependaj de kaj temperaturo kaj humideco) negative influas ne nur la manĝplantojn mem, sed faras ĝin mortiga por homoj fari fizikan agrikulturan laboron ekstere.

### Kvanto de perforte delokitaj homoj nun superas 110 milionojn

Nombro da perforte delokitaj homoj (milionoj)



Fonto: UNHCR 2023

Ĉi tiuj ne estas malproksimaj minacoj, sed ili jam okazas ĉirkaŭ ni. Plej multaj el ni jam vidis kelkajn efikojn de klimata ŝanĝo sur nia manĝaĵo: pli altaj manĝeprezoj rezultigis nutraĵan sekurecon, precipe por vundeblaj loĝantaroj. Politika malstabileco estas alia. Estis argumentite ke la "Araba printempo" de la fruaj 2010-aj jaroj, politika malstabileco kaj revolucioj kiuj disvastiĝis trans multaj landoj en la araba mondo, estis ekfunkciigita ne de araboj "vekiĝantaj" subite kaj malkonsentante kun la registaroj sub kiuj ili vivis dum generacioj – sed per granda altiĝo de manĝaĵaj-prezroj, kaŭzitaj de jaroj da sinsekvaj trosekecoj, kiuj malebligis al multaj meti manĝaĵojn sur la tablon. Malmultaj aferoj estas pli efikaj por kaŭzi revolucion ol kiam oni ne plu povas nutri la familion. La sekvoj de amasa migrado de milionoj da sirianoj el ilia lando, precipe al Eŭropo, kaŭzis grandajn sociajn kaj politikajn malordojn. Ni apenaŭ povas kontempli, kiaj povus esti la sekvoj de multaj pliaj (kaj pli grandaj) landoj kolapsantaj simile.

Estas klare, ke ni iros en tre danĝeran teritorion, alfrontante problemojn, kiuj minacos naciajn ŝtatojn kaj modernan civilizacion mem. La efikoj de klimat-ŝanĝo rekte sur homa migrado ankoraŭ estas nek klare antaŭvidebla nek plene esplorita, sed la grandaj temoj oni jam vidas. Nome, ni verŝajne vidos skalon de migrado ĉi-jarcente – kaj ene de nacioj kaj internacie – kiu estos senprecedenca en la historio de la homaro. Aldonitaj al la historiaj kaŭzoj de migrado por ekonomiaj kialoj, estos multe pli da popoloj translokiĝante por fuĝi de malsato, milito, marnivel-altiĝo kaj politika kaj socia kolapso. Jam ekzistas lastatempaj ekzemploj de landoj kiuj alfrontas ĉi tiuj tipoj de krizoj: Libano, Sri-Lanko, Haitio, Bangladeŝo, kaj pli. Sub multaj klimataj scenaroj ĉirkaŭ 2-3°C varmiĝo – al kiu ni nun iras – multaj landoj en tropikaj kaj subtropikaj latitudoj eble devos esti forlasitaj ĉi tiun jarcenton; la mondmapo estos redeseignita.

Tio levas gravajn novajn demandojn al ni, kiel diasporo, kaj esperantistoj devas komenci kontempli ĉi tiun estontecon. Ĉu nia komunumo estos preta por la defioj? Multaj esperantistoj estos devigitaj fuĝi de siaj urboj kaj landoj. Ĉu ni havos la socian infrastrukturon por helpi unu la alian – precipe la plej vundeblajn esperantistojn inter ni, en tropikaj kaj subtropikaj regionoj - por travivi la alfrontotajn minacojn? Ni vidos societajn ŝanĝojn ĉi tiun jarcenton malkiel iu ajn dum la historio de la homaro; sennombraj malgrandaj lingvaj kaj kulturaj komunumoj malaperos en la turbuleco. Ĉu ni preparos nin, por ke nia komunumo ne estu unu el ili?

# Venu kaj konu, Mongolio atendas vin!



Bela mongola paŝtejo Foto de John Huang

Karaj legantoj,

Saluton el Mongolio, lando de tradicia nomada kulturo kun moderna tutmonda civilizacio!

Por mi estas plezuro skribi ĉi vortojn sur la paĝoj de nia bulteno «La Merkato». Kiel vi scias, ke lastatempe IKEF aktivas. Krom ĝiaj tradiciaj laborkampoj, ankaŭ turisma kampo interesas la organizon, kaj tial la bulteno invitas turismajn organizantojn kaj vojaĝemulojn sendi ĉi-rilatajn artikolojn.



*Chimedtseren Enkhee*

Por tiu celo, ĉi-tie mi deziras skizi kelkajn informojn pri mia lando.

Mongolio estas taŭga loko por vojaĝi, pro ĝiaj naturo, civilizacio, kulturo kaj historio.

La naturo estas pitoreska, virga kaj varia: grandaj montoĉenoj, densaj arbaroj kaj tajgoj, longaj riveregoj, vastaj stepoj kaj dezertoj kun oazoj. Piedvagantoj, ĉeval- kaj kamelrajdantoj, montgrimpantoj, ĉasturistoj, birdobservantoj trovos veran kontentiĝon.



Foto de John Huang

Grego da ŝafoj



Grego da bovoj

Foto de John Huang

Vi ankaŭ povus spertiĝi pri vivmaniero de mongolaj nomadoj en kamparo. Delonge kaj ĝis nun ili vivtenas sin per brutbredado, ĉasado, rikoltado de fruktoj kaj nutraj herboj. Kaŭze de siaspecaj naturaj kondiĉoj, mongoloj ne tiel vaste kultivis. La brutbredantaj familioj translokiĝadis laŭsezono por ekvilibrigi diferencojn de naturaj kondiĉoj, ĉar mongola brutbredado estas tute alia ol brutarbredado en loksidaj landoj. La mongola brutaro mem nutriĝas en paŝtejoj dum la 4 jarsezonoj.

Nomadaj mongoloj loĝas en jurtoj kiuj konformas al vivo kaj nomadumo.

Por kompletigi sian energion, precipe dum vintro, mongoloj preferas nutriĝi per viando, krom legomoj,

herboj, fruktoj ktp. Somere ili preferas ĉefe laktaĵojn. La viando de mongola brutaro estas iom alia: ĝi estas bongusta kaj bonkvalita pro la diversaj herboj kiuj estas riĉaj je sanefikaj kaj nutrigaj elementoj. Oni povus diri, ke la brutaro estas preskaŭ duonsovaĝa.



Mongola gruntbovo Foto de John Huang



Nun konservante tradiciojn de siaj pragepatroj la brutbredantaj familioj vivas, en la kamparoj kaj vilaĝoj en bonaj kondiĉoj kiel en urbo. Ili uzas diversajn elektrofontojn konformaj al la naturo kaj modernajn telekomunikilojn.



Mongola paŝtisto kaj kameloj

Foto de John Huang

Do, vi povus eĉ mem sperti ilian vivmanieron kunloĝante kun ili, kuirante mongolajn manĝaĵojn, brutbredante, ĉeval- kaj kamelrajdante ktp.



Foto de John Huang

Mongolino faras olekremon en sia jurto

Sekva via eventuala ebleco estus sperti vivon de urbanoj. Nur en la ĉefurbo Ulanbatoro loĝas preskaŭ duono (1.5 mln.) de la tuta loĝantaro (3.4 mln.). La urbo estis fondita en 1639 aliloke, tamen ĝi ankaŭ “nomadumis” pli ol 20-foje kaj nur en 1778 finlokiĝis en nuna teritorio. Ulanbatoro estas la plej granda urbo en la lando. Tie vi povus vidi diverskolorajn bildojn de tradiciaj kaj modernaj distriktoj.

Vojaĝante tra kamparo kaj urboj, vizitante allogajn muzeojn kaj teatrojn vi spertos la specifan kulturon kaj historion de mongoloj.

**Bonvenon al Mongolio!**



Ekfluginte el Ulanbatora flughaveno...

## Aldone

### Eventualaj ebloj por turismumi en la lando:

- Urba ekskurso (muzeoj, teatroj, koncertoj, manĝejoj, amuzejoj ktp.)
- Natura ekskurso (stepo, montarbaro, Gobi-dezerto): Piedvagado, ĉeval- kaj kamelrajdado, montgrimpado, birdorigardo ktp
- Konatiĝa ekskurso kun vivmaniero de nomadaj familioj
- Religi-kultura ekskurso (temploj)
- Histori-kultura ekskurso (muzeoj, ruinoj, surŝtonaj bildoj kaj skribaĵoj, statuoj, monumentoj)
- Ĉasado kaj fiŝkaptado
- Kaj aliaj

### Skize pri la lando

**Geografia situo:** centra kaj orienta Azio (najbaroj: Rusio kaj Ĉinio)

**Areo:** 1.5 mln. km<sup>2</sup> (teritorie la 18-a plej granda lando en la mondo)

**Klimato:** averaĝaj temperaturoj: somere +20 ĝis +30C, vintre -20 ĝis -30C; absolutaj temperaturoj: somere +40, vintre -50. Vintre multe neĝas, somere pluvas ne tiom multe. Tutjara precipitado: 200-300 ml.

### Fotoj de *Chimedtseren Enkhee*



*Statuo por Suĥbaatar, gvidanto de popola revolucio en 1921*



*Statuo por eminenta mongola esperantisto B. Rinĉen*



*Surstrate de Ulanbatoro*

**Fiziografio:** Mongolio troviĝas averaĝe 1580 metrojn super marnivelo. La teritorio dividiĝas en montarbara, stepa kaj Gobi-dezerta partoj. En la lando troviĝas grandaj montoĉenoj: Altaj, Sojon, Ĥangaj kaj Ĥentij.




Foto de John Huang

#### *Grego de ĉevaloj*

**Grandaj riveroj kaj lagoj:** el ĉirkaŭ 4000 riveroj (67000 km), la plej longaj estas Orĥon (1124 km), Ĥerlen (en Mongolio 1090 km), Tuul (704 km), Zavĥan (670 km), Selenge (en Mongolio 593 km), Ĥovd (516 km), Eg (475 km), Ider (452 km), Delgermörön (445 km) kaj Onon (298 km en Mongolio el 520 km en Siberio, Rusio). El ĉirkaŭ 3000 lagoj (0,1 km<sup>2</sup>), la plej grandaj estas Uvs (3350 km<sup>2</sup>), Ĥuvsgul (2760 km<sup>2</sup>), Ĥar-Uvs (1852 km<sup>2</sup>) kaj Ĥjargas (1407 km<sup>2</sup>).

**Loĝantaro:** 3.4 mln. (mongoloj 95%, kazaĥoj 5%, la mongola nacio konsistas el pli ol 20 gentoj).

**Lingvo kaj alfabetoj:** la mongola lingvo apartenas al Altaj-lingvaro.



*Montarbara regiono*

La mongolaj gentoj havas siajn dialektojn. Dum sia historio mongoloj verkis kaj uzis ĉirkaŭ 10 alfabetojn.

**Politika sistemo:** Mongolio estas respubliko de parlamentisma demokratio. Ŝtatestro estas la Prezidento (nereelektebla kun limigitaj rajtoj, mandato por 6 jaroj). Gvidorganoj estas la Parlamento kaj la Registaro (ambaŭ kun mandatoj por 4 jaroj). La juĝa sistemo estas sendependa de la politiko.

### Historio skize:

Periodo de **Hun-regno** (jarcentoj XII A .K. – I)

Periodo de **Sumbe-regno** (jarcentoj I – IV)

Periodo de **Nirun-regno** (330 – 555)



*Muzeo "Ĉingis-Ĥano" (nova muzeo)*

Periodo de **tjurka regno** (552 – 745). Poste tjurkoj migris okcidenten kaj fondis sian regionon en malgranda Azio (nuna Turkio).

Periodo de **ujgura regno** (745 – 840)

Periodo de **Hirgisa regno** (840 – 924; prapatro de nuna kirgiza nacio)

Periodo de **Kidana regno** (917–1128, alinome Ljao-regno). Ĝi estis la plej granda kaj potenca ŝtato antaŭ la Mongola Unuiĝinta Imperio, kiu limis sude la ĉinan Sun-dinastion per nuna Ŝansi provinco. Ĝia ĉefurbo estis nuna Pekino.



*Ĉefa preĝejo de Gandan templo*

**Periodo de Unuiĝinta imperio.** En la XII-a jarcento kaj komence de la XIII-a jarcento sur la mongolia teritorio troviĝis multaj memstaraj regnoj, devenaj de la mongola, tjurka kaj manĉua etnoj. Tamen el ili Hamug-Mongol regno eksuperinte sub gvido de Ĝingis-Ĥano (propra nomo Temuĝin) sukcesis unuiĝi ĉiujn mongolajn regnojn post la 20-jara batalado.

La imperio sukcesis starigi stabilan registaran sistemon kaj fari Azion antaŭ Eŭropo ne simple nekonata stepa kaj monta spaco, sed kunigita civilizacio. En la jaro 1220 Ĝingis-Ĥano fondis Karakorumon – la ĉefurbon de la Mongola imperio. Kvankam Ĝingis-Ĥano, liaj filoj kaj nepoj fondis en la mondo la plej gigantan regnon sur 2 kontinentoj, nome Azi-Eŭropo, tamen ĝi dividiĝis je 4 grandaj partoj (preskaŭ memstaraj imperioj).



*Signo de 0 punkto de Ulanbatoro sur centra placo*

**Periodo de Juan-regno** (1271–1368). Nepo de Ĝingis-Ĥano nomata Kublaj-Ĥano fondis la mongolan Juan-ŝtaton kaj poste proklamis urbon Dadu (nuna Pekino) kiel ĉefurbon de la nova imperio. Kublaj-Ĥano daŭrigis la politikon de siaj prapatroj kaj plivastigis sian teritorion ĝis la hinda-ĉina duoninsulo. Tamen pro ribelo de ĉinoj la mongola Juan-ŝtato falis en Ĉinio en 1368, kaj oni forpelis mongolojn malantaŭ la Grandan Muron. De tiam ĝis la jaro 1636 mongoloj regis sian ŝtaton sur sia teritorio.



*Statuo por Ĝingis-Ĥano, antaŭ la ŝtata palaco*

